

revuo

esperanto

novembro 1966

59-a jaro

n-ro 732 (11)

universala esperanto - asocio (en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)



ESPERANTO

revuo internacia

enhavo

- 173 Ni al kutimiĝu pensi "fake" (Jaumotte)
Lastmomente: Propono transdonita al U.N.
- 174 La klimato de Tel Aviv laŭ medicina vidpunkto
(Maŝler)
- 176 Recenzoj
Ricevitaj eldonaĵoj
- 177 Mallongaj novaĵoj
- 178 La juna vivo
- 179 52-a Universala Kongreso, Tel Aviv, 1967
Aervojaĝo de UEA al Tel Aviv
Esperanto en radio
- 180 Pliaj dumvivaj membroj (Woessink)
Nekrologoj Barbiellini, Krestanov
Memoriga kalendaro
- 181 Oficiala informilo n-ro 395
La internaciaj konkursoj 1966
- 182 Anoncetoj

kovrila bildo

La prezidanto de UEA transdonas al s-ro C.V. Narasimhan, Sub-Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj por Aferoj de la Ĝenerala Asembleo, la Proponon de UEA okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro. (Vidu p. 173). En la mezo: s-ro Mark Starr, kiu reprezentis Esperanto Information Center. (foto: Leo Rosenthal)

bildojn liveris

- 174 (supre) Joseph Leor
- 175 Near East Tours, Amsterdam

esperanto
novembro 1966

**oficiala organo
de universala
esperanto-asocio**

(en konsultaj rilatoj kun u.n.e.s.c.o.)

Fondita en 1904 de H. Hodler

Redaktoro: D-ro V. Sadler

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto (abonado, reklamoj, manuskriptoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando. Telef.: (010) 23 27 88 Ĝirkonto 378964.

TELEGRAMOJ: ESPERANTO ROTTERDAM.

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ la 1-a de la antaŭa monato.

Manuskriptoj por "Esperanto" estu tajpitaj en 2 ekzempleroj sur unu flanko de la papero kun interlinia spaco kaj tre larĝa margeno.

Bankisto de U.E.A.:

Mees & Hope, Blaak 10, Rotterdam-1.

Presisto: Drukkerij Zwagers c.v., Rotterdam-6.

Traduko kaj represo de artikoloj, kun escepto de verkoj premiitaj en konkursoj, estas permesitaj, kondiĉe ke oni menciu la fonton.

Jara abono (1967): 18,75 gld. (kun membreco kaj jarlibro 25,— gld). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj: ricevebla laŭ peto.

Anoncetoj:

0,20 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Tekstoj de anoncetoj kaj reklamoj aperas ekster la respondeco de la Redakcio.

Legantoj en 83 landoj.

Estraro de U.E.A.:

Prof. d-ro I. Lapenna, prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

S-ro E. L. M. Wensing, vic-prezidanto, Postbus 412, Eindhoven, Nederlando.

S-ro E. Carlén, vic-prezidanto, Yxhult, Hällabrottet, Svedujo.

S-ro G. Becker, ĝenerala sekretario kaj estrarano pri informado kaj kongresoj, 6653 Blieskastel, Schlossbergstr. 51, Germanujo.

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj, 32 avenue Etienne Billières, 31-Toulouse-03, Francujo.

S-ro M. Jaumotte, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj, 44 De Bruynlaan, Wilrijk-Antwerpen, Belgujo.

S-ro J. Toczyski, estrarano pri lernejoj, skr. p. 57, Gdańsk, Pollando.

S-ro E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando.

Reprezentanto de TEJO ĉe la Estraro de UEA: S-ro H. R. Tonkin, Dept. of English, University of Pennsylvania, Philadelphia, Pa. 19104, Usono.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, Telefono: ARNold 9081.

Serva Centro: ĉe J. J. Sturzenegger, Rothstr. 7. 8057 Zürich, Svislando.

Preskaŭ ĉie en la mondo regas, sur la regiona kiel sur la loka plano, la spirito de la "preĝeja turo", kiu povas esti tiu de loka futbalsocieto aŭ de loka bicikla heroo.

Pro tiu spiritstato, la homo alkutimiĝis pensi pri surloka situacio, surloka ebleco, profito kaj bono... Kaj nur poste vekigis en li la atento, la interesiĝo kaj admiro por io regiona, nacia kaj poste ankaŭ internacia.

El tio verŝajne ekiĝis, ke tiuj, kiuj deziras grupiĝi por kiu ajn celo, tion unue faras sur la loka tereno, kaj ke nia movado same disvolviĝis tra la lokaj grupoj al la naciaj federacioj kaj la universala asocio.

En la lasta tempo tamen, — kaj verŝajne pro la evoluo de la ĉiutaga vivo —, tio ŝajnas ŝanĝiĝi; beboj, kunportitaj en la gepatra aŭtomobilo por semajnfinaj ekskursoj, ekkonas, nun jam, forajn vidindaĵojn ofte antaŭ la surlokaĵoj... Ili kelkfoje vidas grandurbajn katedralojn antaŭ ol iliaj okuloj adaptiĝis al la rigardo de simpla vilaĝa preĝejo. Kaj ni havas la impreson ke, iom post iom, la antaŭa hierarkia pensmaniero perdos grandan parton de sia valoro.

Ni antaŭvidas ke, pli kaj pli, la atento, la admiro je propra surloka belo, la fiereco ankaŭ pro aparteno al loka grupo aŭ gento, forfalos... Kaj la teknika evoluo de la mondo plirapidigos tiun evoluon.

La vivo dum la lastaj jaroj tiagrade ŝanĝiĝis ke, en grandaj kaj eĉ mezgrandaj urboj, oni preskaŭ tute perdis la kontakton kun la kolektivo, ĉar oni tutsimple ne plu konas sian plej apudan najbaron, ofte eĉ ne la kunvivanton en unu granda domo.

Kaj pro tio la informado de homo al najbara homo preskaŭ ne plu eblas.

Ni vivas nun en la epoko de la ĝeneraligita 3 x 8: 8 horoj por labori, 8 horoj por distriĝi aŭ hobiaj, kaj 8 horoj por dormi.

Kaj evidentiĝas, ke la homoj, ĉe kiuj ni nun plej efike povas varbi, estas la homoj, kun kiuj ni ĉiutage vivas dum pluraj horoj en nia laborejo aŭ kun kiuj ni hobiaj, ĉu sporte, ĉu kulture.

Tio do signifas ke, estonte, ni — ne nur individue, sed ankaŭ en pli larĝa grupa kaj regiona kadro — devos pensi, ne plu kiel antaŭe, sed en la senco de la profesioj kaj de la distraĵoj... tio estas do la "FAKOJ".

UEA okupiĝis preskaŭ ekde la komenco pri fakoj: ekde la momento, kiam ĝi akceptis sian unuan FAKdelegiton.

El la raporto, kiun ni prezentis dum la unua

ĝenerala kunsido en Budapeŝto, evidentiĝis tamen, ke ni havas fakdelegitojn ne ĉiam tie, kie ni pro difinita kialo ilin vere bezonas, sed kie iu sin mem prezentis por tiu fako, kiu tre ofte eĉ ne rilatas al lia profesio, nek al lia ĉefa priokupo.

Ekzemplo pri tia neorganiziteco estas, ke ni havas, en la tuta mondo, DU delegitojn pri Ruĝkrucaj Aferoj. ... Oni ja povus konsideri, ke la Ruĝa Kruco estas sufiĉe oficiala organismo, por ke ni ne bezonu fakdelegitojn pri ĝi... Sed se ni havas DU, ni ridindigas nin en la okuloj de ĉiuj, kiuj okupiĝas pri ĝi... Same, pri Rotario estas 9 delegitoj: 4 en Britujo kaj 5... en la tuta ne-brita mondo!

Alia ekzemplo estas, ke ni ja havas turismajn delegitojn en preskaŭ ĉiuj landoj: estas en proks. 150 lokoj; sed ne estas en dekduo da eŭropaj ĈEFurboj!

La turismo tamen iĝis en la lastaj jaroj tiel grava ekonomia kaj socia faktoro, ke ni nun povas, kaj devas postuli, ke en ĉiu loko IU efektive okupiĝu pri ĝi, kiu esploru ĉiujn tiurilatajn problemojn kaj disponu pri ĉiuj dokumentoj utilaj por la servado de eksterlandanoj, kiuj nepre devas trovi ĉe niaj fakdelegitoj helpon egalan al tiu, kiun donas la turismaj oficejoj; sed kun la granda avantaĝo, ke ĉio povas okazi pere de komuna lingvo.

La homo, kiu tiel okupiĝos pri la turismo, povas kompreneble esti la nuna delegito, kiu cetere ĝis nun plenumis la rolon. Sed tiukaze tiu delegito plenigu plian formularon, ankaŭ pri fakdelegiteco, tiel ke, sub lia nomo de delegito en la Jarlibro, klare aperu: FD (Turismo) = la D.

Kaj en la urboj, kie la delegito ne povas iom specialiĝi pri turismo, li aŭ oni klopodu trovi kiel eble plej baldaŭ taŭgan funkciulon.

Konklude (por hodiaŭ) ni diru, ke la kongresa Rezolucio petas ĉiujn lokajn, regionajn kaj landajn instancojn *tutspeciale atenti la fakojn*, kaj tiucele ŝajnas necese, ke la ĉefdelegito faru plenan pristudon de la nuna stato de siaj fakdelegitoj, por ekscii klare kie estas gravaj mankoj. Se, pro iu kialo, la ĉefdelegito ne povas fari, li interkonsentu kun alia delegito, kiu agos iom kiel lia anstataŭanto kaj faros tiun studon. Krome la speciala komisiono petis, ke en ĉiu loka, regiona aŭ nacia instanco estu UNU persono en la estraro, kiu havos kiel specialan zorgon priatenti la fakojn.

Sed pri ĉio tio ni reparolos en sekvonta artikolo.

LASTMOMENTE: PROPONO TRANSDONITA AL U.N. EN NOVJORKO


La 6-an de oktobro sep-persona delegacio de UEA, sub gvido de la prezidanto, prof. Ivo Lapenna, transdonis al s-ro C. V. Narasimhan, sub-sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, la Proponon pri solvo de la lingva problemo, subskribitan de 920 954 individuoj kaj 3843 organizaĵoj kun 71 165 000 membroj. S-ro Narasimhan konsentis komuniki la Proponon al la Ŝtatoj-Membroj per speciala aldona dokumento sub la punkto Jaro de Internacia Kunlaboro, ankoraŭ dum la nuna sesio de la Ĝenerala Asembleo. Detaloj sekvos en decembro.

esperanto
novembro 1966



Jafo ĉe Tel Aviv: preĝejo Sankta Petro

LA KLIMATO DE TEL AVIV LAŬ MEDICINA VIDPUNKTO



Koncerne la venontan U.K. en Tel Aviv revivas la ĉiama demando, ĉu la klimato en Israelo estas konvena por tiaj entreprenoj dum la varmaj someraj monatoj. Antaŭ la fina respondo mi donos kelkajn informojn pri klimato kaj vetero en Tel Aviv.

La urbo Tel Aviv havas mildan mediteranean klimaton. Malgraŭ la 32-a grado de latitudo en Tel Aviv la temperaturo atingas nur 31-32° C. (89° F) dum la unuaj tagoj de aŭgusto, ĉar ĝi estas mildigita de la najbareco de Mediteraneo. La diferenco en diversaj jaroj ne estas pli granda ol plus-minus 1° C. Dum nokto la temperaturo falas ĝis 28° C. La temperaturo de la mara akvo estas 28° C. Dum tago blovas konstanta vento de la mara flanko. Ĝi multe helpas al homoj, kiuj malagrade sentas altajn temperaturojn. Vespere la vento ĉesas, kaj dum nokto la direkto de la vento estas kontraŭa, de oriento okcidenten. Tia fenomeno estas kaŭzita de la diferenco de temperaturoj de la akvo kaj de la tero, kiuj malsamrapide varmiĝas kaj malvarmiĝas.

Estas ankaŭ alia stabila fenomeno en la israela klimato. Dum someraj monatoj ne pluvas. Eĉ ne unu guto da pluvo falos! Ne okazos tempestoj! Nuboj estos nur malmultaj, ĉar Israelo situas en regiono, kie nubkovraĵo de la ĉielo estas tre modesta. Malsekeco en Tel Aviv atingas 65-75 %. Diferencoj dependas de distanco de la maro.

Malgraŭ la malgrandeco de Israelo diferen-

La varmega dezerto Negev

coj de klimato estas tre signifaj. La supragalilea klimato estas tre agrabla, la lago Kineret (Genezaret) havas subtropikan klimaton kaj Morta Maro kaj suda Negev varmegan dezertan klimaton.

Reagado de la turisto, kiu vizitas Israelon, estas individua. Estas multaj homoj, al kiuj ne plaĉas tiel alta temperaturo. Por ili oni povas aserti, ke ankaŭ en meza Eŭropo kaj en suda Skandinavio la temperaturo iam atingas saman altecon. Pli alta estas nur la nokta telaviva temperaturo. Ankaŭ la daŭrigo de varmaj tagoj estas alia, ol en Eŭropo, sed ĉi tio ne estas malagrablaĵo por turistoj kun limigita vizittempo. Ĉi tie mi volas citi la vortojn de iu usona turisto, kiu miris, kial multaj homoj estas malkontentaj pri la israela klimato. "Kion vi volas? Ĉiam varme, ĉiam sunece, neniam pluvas, estas paradizo!" La sama turisto post kelkmonata restado diris: "Ree tiu malbenita, suna, bela vetero!" Por mallonge-restantoj ni povas promesi: multe da suno, varmecon, varman sablan plaĝon kaj certan bonan senpluvan belan veteron.

Malsanoj maloftigitaj

Nur iom pri influo de la klimato al homa sanstato. En Israelo ne ekzistas jam malsanoj, kiuj estas konataj kiel tropikaj malsanoj. Malario estas 100% elradikigita. Ne ekzistas jam kazoj de leŝmaniozo kaj similaj. Kutimaj infektaj malsanoj ne estas pli oftaj ol en Eŭropo kaj Usono, mirinde tamen estas, ke preskaŭ ĉiuj estas pli mildaj ol en pli nordaj regionoj. La kaŭzo ne estas konata. La tuberkulozo estas same moderigita kiel en la plej progresintaj regionoj de la mondo. Veneraj malsanoj estas distingeble malpli oftaj, ol en iu ajn alia angulo de la mondo.

La plej grava demando estas, ĉu kor- kaj sangpremmalsanuloj povas ĉi tien sendangere veni. Nia klimato kaŭzas intensan ŝvitadon. Per tio perdas dum la tago homo kelkajn litrojn da akvo kun ia kvanto da salo. Ĉiuj, kiuj malsanas je tiaj malsanoj, scias, ke la kuracistoj malpermesas al ili manĝi multe da salo, eĉ donas rimedojn por plifortigo de sekrecio de akvo kaj salo. La telaviva klimato faras tion pli simple kaj pli efike. La homoj, kiuj suferas de kordoloroj pro arteriosklerozo de koronariaj arterioj (de la koro), sentas sin en varma klimato pli bone, ĉar varmece kaŭzas plilarĝigon de la arterioj. Mi ne volas iluziigi kormalsanulojn, ke ili povas kuracisajn malsanojn en Israelo dum mallonga restado, sed al la plimulto oni povas promesi subjektivan plibonfarton.

Ne malestimu la sunon!


Specialan rolon ludas sunradiado al la homoj. Ĝi estas en Israelo tre forta. Israelanoj evitas laŭ sia ebleco ĝin. Oni devas averti tiujn, kiuj volas bani sin en la maro! Bonvolu brulbrunigi

vin antaŭ alveno Israelon. Brulbrunigita haŭto povas rezisti dum multaj horoj sunradiadon, sed kiu ne povis tion fari antaŭ alveno Israelon, devas bani sin antaŭ la 10-a matene aŭ post la 4-a posttagmeze. Tiuj, kiuj volas tion fari tagmeze, bonvolu post eliro el la akvo kovri la korpon per ia maldika vestaĵo kaj la kapon per pajla ĉapelo. Atenton! La sunradiadon oni ne sentas tuj, nur kelkajn horojn poste, kaj brulvundoj povas aperi nur dum nokto. Memoru! en Israelo oni devas multe trinki, ĉar per ŝvitado oni perdas multon da akvo, kaj tio povas endanĝerigi nesingardemulon. Kontraŭe: la malsanuloj, kiuj gardas sensalan dieton, povas permesi al si iomete saligi la manĝaĵon, ĉar perdo de la salo per ŝvitado postulas kompenson.

Tuberkulozmalsanuloj devas eviti marbanaĉdon dum forta sunradiado, sed povas ĝui ĝin dum matenaj kaj vesperaj horoj.

Alklimatiĝo estas daŭra procedo kaj por limigita turista restado ne influas la supre menciitajn regulojn. Ĉiuj reguloj tute ne koncernas diligentajn Kongresanojn, ĉar kunsidoj okazas nur en malvarmigitaĵ salonoj, kie la temperaturo estas 25° C kaj la malsekeco konvena al la homa korpo.

Veturiloj antikva kaj novaj taŭgas al la tereno



Geologio (Éléments de géologie en six langues). Eld. SEDES, Parizo, 1965. 191 p. 24 × 16 cm., il. Paralelaj tekstoj angla, Esperanta, franca, germana, hispana, rusa.

La Internacia Lingvo ankoraŭ ne estas tre disvastigita en la geologiaj medioj. Pro tio estas des pli ĝojige, ke nia kolego Cailleux, jam konata pro siaj plurlingvaj geologiaj terminaroj, aldonis Esperanton al sia libro pri Elementoj de Geologio. La celo estas diskonigi la bazajn principojn de la geologio al ĉiuj per komparo de la ses tekstoj, tamen pledante por uzo de nur unu lingvo, Esperanto.

En la esperanta traduko, nia kolego Gérard renkontis plurajn malfacilaĵojn pro manko de

taŭga terminaro. Li devis krei multajn fakajn esprimojn. La rezultaton oni vere devas admiri, malgraŭ la fakto, ke kelkaj novekreitaj terminoj estas ne tute akcepteblaj aŭ iom tro francaj. Ekzemple, la enkonduko de la vorto petro, anstataŭ roko aŭ rokaĵo estas tute superflua. Ne estas necese krei novajn terminojn, kiam eblas uzi esperantajn vortojn jam esprimantaj la saman ideon.

Tamen ni opinias, ke la verko estas nepre paŝo antaŭen en la geologiaj sciencoj. Fakuloj povos uzi la terminojn en siaj publikaĵoj, kaj nefakuloj povos ekscii iom pri geologio per ĉi tiu libro.

J. M. Mabesoone (Brazilo)

Rakontu, samideano. 20 aŭtoroj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag, 1966. 69 p. 21 × 15 cm. 4,50 gld. *

Rakontoj de 20 aŭtoroj diverslandaj pri spertoj el sia esperantista vivo.

Kritikinda estas kelkfoja nekutima uzo de prepozicioj: sin okupi *per* (anst. *pri*), trankviliĝi *en* (anst. *pri*), pleŭrito akirita *en* la batalfronto (anst. *ĉe*), diveni *en* intuicio (anst. *per*, aŭ *diveni intuicie*). Strangaj estas esprimoj kiel "mi vivas en mia hejmo kaj veteraneco" kaj "ŝi diris per tre malfermitaj okuloj." Malgraŭ tio: streĉaj rakontoj en flua, agrable legebla lingvo. Papero bona. Preseraroj preskaŭ ne estas.

Entute simpla sed bona verketo kiu, plene respondante al la espero de la eldonisto, estas bonega materialo por konversacio en klubkaj kurslaboro kaj eble instigos multajn legantojn pli ofte praktike apliki nian lingvon.

Hector Boffejon (Belgujo)

Mozaiko de lumo kaj ombro, poemoj de M.E. Brisigelo; el la hispana Diego Selso. La 100-ekzemplera eldonejo, Kordobo, 1966. 28 p. 21 × 16 cm., multobl. Eldono Esperanta-hispana. *

Specimenaj temoj: printempo, la urbo, malespero, kompatato. Malantaŭ la liberaj versoj ne vidiĝas elstare originalaj ideoj. La traduko ne legiĝas tre flue sed povas servi kiel helpilo por kompreno de la kunpresita hispana originalo. Mankas tute informoj pri la aŭtoro.

V.S.

Niaj plej grandaj verkistoj, de Diego Selso. La 100-ekzemplera eldonejo Kordobo, 1966. 28 p. 21 × 16 cm., multobl. *

Temas pri simpla, plejparte ĝusta enkonduko en la originalan literaturon kun citaĵoj el la menciataj verkoj. Ĝian utilon limigas tro kuraĝa esperantigo de propraj nomoj ("Antono Grabovsko" k.s.) kaj kelkaj gravaj preterlasoj, ekz. Szathmári.

V.S.

RICEVITAJ ELDONAĴOJ

Paŭlo kaj Stefano, historia romano de Francisco Cândido Xavier. El la portugala tr. L. C. Porto Carreiro Neto. Eld. Brazila Spiritisma Federacio, Rio de Janeiro 1966. 543 p. 18 × 13 cm. *

Sankta Eŭkaristio. La ĉefaj preĝoj. Eld. Internacia Katolika Informejo, Nederlando, 1966. 56 p. 16 × 10 cm., ofsetita. 1,— gld. *

Daŭrigu la revolucion ĝis la fino, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 26 p. 15 × 10 cm. 0,40 gld. *

Montotranslokigo fare de malsaĝa avo, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 5 p. 15 × 10 cm. 0,25 gld. *

Servu al la popolo, de Maŭ zedong. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 8 p. 15 × 10 cm. 0,25 gld. *

Konfeso de la novaj gvidantoj de KPSU pri sekvido de la linio de kunlaboro inter Sovetunio kaj Usono. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 25 p. 15 × 9 cm. 0,25 gld. *

La gvidantoj de KPSU estas perfiduloj de la Deklaracio kaj Deklaro. Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1966. 12 p. 15 × 9 cm. 0,25 gld. *

Nova antologio. El div. lingvoj tr. Antoni Grabowski. Eld. PEA, Varsovio, 1965. 31 p. 19 × 15 cm. Ofseta represio. Poemaro. 3000 ekz.

Multekolora bukedo, artikoloj kaj rememoroj de Gösta Henriksson. Eld. la aŭtoro, Malmö, 1966. 35 p. 22 × 18 cm., multobl.

Martín Fierro, de José Hernández. El la hispana E. Sonnenfeld. Eld. Stafeto, La Laguna, 1965. Serio Oriento-Okcidento n-ro 5. 289 p. 21 × 15 cm., tolbind. *

Vojaĝo inter la tempoj, gramatika studo de K. Kalocsay. Eld. Stafeto, La Laguna, 1966. 197 p. 22 × 16 cm.

Prepozicioj laŭ uzoj, de Kenĵi Ossaka. Eld. Japania Esperanto-Instituto, Tokio, 1966. 64 p. 18 × 13 cm. Japanlingva.

Vocabulario Español-Esperanto (Vortaro hispana-Esperanta), de E. Tudela-Flores. Eld. la aŭtoro, Valencia, 1966. 2-a eld. 527 p. 17 × 12 cm. Kartonbind. 13,— gld. *

LAŬLANDE

Aŭstrujo

● En aŭgusto la urbo Knittelfeld solene akceptis s-ron Kinsuke Ito kaj f-inon Jumijo Iŭamoto, senditoj de Oomoto en Kameoka, japana urbo ĝemeligita kun Knittelfeld. La gejunuloj pli frue ĉeestis la ĉi-jarajn kongresojn de UEA kaj TEJO.

Brazilo

● En la solenaĵoj de la sukcesa unua Seminario de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Rio de Janeiro (26-28 aŭgusto) partoprenis la soveta ambasadoro Sergej Miĥajlov, kiu mem parolas Esperanton.

Britujo

● De 20 ĝis 26 aŭgusto okazis denove kursoj por instruistoj en Barlaston. La nivelon indikas la nomoj de la prelegantoj: Wells, Higginbottom, Auld, Rytjkov, Boulton, Gregor kaj Markarian.

Ceĵlono

● Lerneja instruado pere de la angla lingvo estos abolita en la venonta jaro. Ĝi restos tamen deviga studobjekto.

Ĉeĥoslovakujo

● La 1-an de oktobro festis sian 60-jariĝon akademiano d-ro Tomas Pumpr, plej konata kiel tradukinto de "Bapto de Caro Vladimir" k.a. ĉeĥaj literaturaĵoj.

Ĉinujo

● Ĉina Esperanto-Ligo informas, ke jam elĉerpiĝis "Noveloj de Lusin", Ĉina Antologio", "Aŝma" k.a. eldonaĵoj. Ankoraŭ livereblaj estas la verkoj de Maŭ zedong kaj diversaj politikaj broŝuroj.

Germanujo

● Dum la "Semajno de la Balta Maro" (Rostock, 10-17 julio) okazis Esperanto-ekspozicio, kiun vizitis pli ol 3000 personoj.

Israelo

● Dum 1965-6 inĝ. M. Savir gvidis aron da kursoj, i.a. tri oficialajn en mezgradaj lernejoj, kaj prelegis 14-foje en lernejoj kaj kibucoj. La prelegojn pagis laborista organizaĵo Histadrut. Nun la ministrejo pri eduko presigas broŝuron pri Esperanto por ĉiuj mezgradaj lernejoj (3000 ekz.).

Japanujo

● La 53-an japanan kongreson, en Nagoja, aŭguste, ĉeestis 360. Riĉa programo inkluzivis diskuton, kiel utiligi Esperanton ĉe la Mondekspozicio en Oosaka en 1970.

Meksiko

● Komenciĝis kursoj por entute 200 gelernantoj ĉe la scienca fakultato de la Nacia Universitato, ĉe la grupo de gvidistoj kaj interpretistoj de la Universitato, kaj ĉe OPIC (Organizaĵo por Internacia Disvastigo de Kulturo).

Norvegujo

● La 26-an de novembro festas sian 50-jaran jubileon la Klubo Esperantista en Oslo, kiu nun havas 152 membrojn.

Soveta Unio

● Laŭ "Moscow News", 66 lingvoj servas hodiaŭ kiel instrulingvoj en la lernejoj de Soveta Unio. Radio-elsendoj okazas en 65 lingvoj enlandaj.

● Pli ol 350 infanoj partoprenis festan kunvenon de lernejo n-ro 77 en Rostov-Don omaĝe al la dekjara jubileo de "Grajnoj en Vento" (vidu marto, p.44).

Svedujo

● Tutlandan prelegvojaĝon pri Hindujo faris en septembro d-ro Aŝvinikumar'. Pri Francujo diversloke prelegis s-ro J. Guillaume.

LAŬFAKE

Literaturo

● En japana libroserio "Personecoj de la mondo" aperis nova traduko (de T. Huĝimoto kaj T. Umesao) de la biografio "Vivo de Zamenhof" de Edmond Privat. La verko jam en 1930 aperis japanlingve, tiam en traduko de K. Macuzaki.

Radio

● En "Ham's Interpreter", 10-lingva frazlibro por radio-amatoroj, ekde nun aperas ankaŭ Esperanto.


Teatro


● Dum la Budapeŝta UK fondiĝis organizaĵo de pup-teatristoj. Ĝi raportis, ke la monda (ne-Esperanta) asocio de pup-teatroj UNIMA diskutos pri enkonduko de Esperanto dum sia venonta komitata kunsido en Berlino.

Turismo

● 400 turismaj oficejoj en Nederlando ekuzos helpilon en la formo de folio kun paralelaj demandoj kaj respondoj en la nederlanda kaj Esperanto, por faciligi interkompreniĝon kun vizitantoj.

Inĝ. M. Savir instruas en religia gimnazio Bar-Ilan, Natanja, (Vidu Israelo)





LA JUNA VIVO

Oficiala organo de

Tutmonda Esperantista Junulara Organizo
Materialojn por "La Juna Vivo" sendu al
H. Bakker, Kastelenstraat 231,
Amsterdam Z, Nederlando

Seminario por gvidantoj de TEJO okazos de 3-10 januaro en Bruselo. Ĝi estos ne nur por funkciuloj de TEJO sed ankaŭ de NEJOj. La programo temas pri la praktiko de organizado kaj celas doni tujan utilon al la partoprenantoj. Presitan broŝuron petu de la NEJO-komisiono (red. LJV).

Trilanda Kunsido

La 13-an de marto kunvenis en Ljubljana, Jug., reprezentantoj de AEJ (Hans M. Maitzen), IEJ (Edvige Tantin) kaj JEJA (Svobodan Zlatnar kaj Dada Zupanĉiĉ). La protokolo mencias i.a.:

- en la kunvenoj de IEJ (Bologna '66, kaj dum pasko 1967 apud la jugoslava limo), JEJA (Slovenio, okt. '66) kaj AEJ (Stirio, marto '67) partoprenos laŭeble membroj de la du aliaj TEJO-sekcioj.
 - komune aranĝotan somerumadon en 1967, dum 14 tagoj, kun partopreno de lerneaj klasoj kiuj lernas E-on.
 - interŝanĝadon de prelegantoj.
- Jen imitinda ekzemplo!

Bulgara Esperanto-Junularo

- eldonis utilan cirkuleron pri aktualaj organizaj detaloj pri BEJ (funkciuloj, kunvenoj, ktp.). En julio okazis la 1-a Internacia Laborbrigado de BEJ, en Veliko Tarnovo. (Laŭ: Informa Fakto de BEJ, pk. 587, Sofio)
- publikigis sian raporton pri agado de 1964-1966. Bedaŭrinde mankas spaco por citado, sed oni legu pri tiu modela agado, petinte la raporton de BEJ, pk. 587, Sofio.

Belgujo

Dum la ĝenerala kunveno okaze de la B.E.F.-Kongreso en Leuven (Lovenjo) je Pentekosto, ankaŭ BEJA havis sian oficialan jar-kunvenon. Oni i.a. elektis novan estraron: ĝenerala prezidanto: Serge Denoël, rue Victor Raskin 20, **Liège**; nederlandlingva prezidanto: Agnes Geelen; franclingva prezidanto: Jacques Hillaire Mpoy; ĝenerala sekretario: Joris Lamarq, Europalaan 10, Gent; nederlandlingva sekr.: provizore J. Lamarq; franclingva sekr.: Jeanine Chaineux; kasistino Ivonne Poupeye.

La nova estraro en septembro fiksas sian laborprogramon.

10-a Internacia Seminario de GEJ.

De 27.12.66 ĝis 3.1.67 okazos la jubilea IS en la moderna, apud-laga kaj preskaŭ urbo-centre situanta junulargastejo de Münster. La rektoro de la universitato estas la Honora Prorektanto, kiu ankaŭ akceptos la partoprenan-

tojn. Krome la programo enhavos viziton al la universitato, podian diskutadon kun neesperantistaj sciencistoj, jarŝanĝan balon, kaj plej grave: 6 prelegojn pri la temo "La mond-percepto de la modernaj natursciencoj". Oni invitis tutan serion da eminentuloj tiucele.

La kotizoj, kiuj inkluzivas la programon, manĝaĵon kaj loĝadon en la junulargastejo dum 7 tagoj, estas GM 70,- por ĝis-25-jaruloj, GM 85,- por pliaĝuloj. Partoprenantoj malpli ol 25-jaraj ricevos dum la seminario 50% repagon de siaj vojaĝelspezoj sur la teritorio de FRG kaj proks. 10.- GM el la kotizo! Rajtas partopreni personoj inter 16- kaj 35-jaraj; maksimuma nombro 80. Limdato de aliĝo 15.12.66.


Loĝantoj en popoldemokratiaj ŝtatoj, kiuj serioze planas partoprenon, petu tuj personan invitleteron, kiu kutime necesas por akiri vizon. Interesiĝantoj petu la duan informilon kaj aliĝilon de Uwe Joachim Moritz, Hafenstr. 75, 44 **Münster**, FRG.

Du geedziĝfestoj en TEJO:

Krystyna Zacharek kaj Andrzej Grzebowski, Clara Claes kaj Ivo Durwael, en junio resp. julio 1966 geedziĝis. Niajn plej korajn gratulojn!

LA NEJO-DOSIERO de TEJO, 23-paĝa

raportanta la rilatojn de TEJO kun centoj da NEJOj, estas daŭre aktualigata per suplementaj cirkuleroj. Jam aperis la tria tia "korektilo". La dosiero estas mendebla je 1,50 gld., 3 rk. aŭ 6 steloj ĉe la red. LJV.



La Esperanto-kurso en la volontula labor-organizo "La Muelejo de Metilernantoj" altiris 20 gejunulojn el 5 landoj. De 17 ĝis 30 aŭgusto ili ĉiutage lernis laŭ la Ĉe-metodo dum 4 horoj, kaj krome kantis, ludis, kaj esploris la belegan regionon. Por 1967 la Asocio de la "Muelejoj" kaj TEJO subskribis interkonsenton, laŭ kiu TEJO klopodos havigi la instruistojn kaj "amuzistojn", kaj la Muelejoj disponigos liberan tempon al la volontuloj por sekvi la kursojn. Pro tio ni apelacias al ĉiu, kiu kompetentas instrui Esperanton, aŭ kiu povas gvidi kantojn, ludojn, ktp., kontakti la NEJO-komisionon de TEJO, kaj peti la stencilitan raporton pri la kurso (adreso Red. LJV). Se eble, ni tiel aranĝos plurajn tripersonajn grupojn, kiuj zorgu pri instruado dum la tuta somero en pluraj muelejoj de meza Francujo kaj eventuale Germanujo.

52-a UNIVERSALA

KONGRESO DE ESPERANTO

Tel Aviv, 2-9 Aŭgusto 1967

Alta Protektanto: Zalman Solar, Statprezidanto de Israelo.

Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando.

OFICIALA KOMUNIKO

N-ro 1 Rotterdam, 22-an de sep. 1966
Kotizoj

La aliĝkotizoj validaj ĝis la 31-a de dec. 1966 estas jenaj.

Kongresano	70,— ned. gld.
Junul. ĝis 20 jr.	21,— ned. gld.
Edz(in)o de kongresano	35,— gld.
Univ. stud. ĝis 30 jr.	34,— gld.
Blindulo	27,50 ned. gld.

Rabatoj: a) Individua membro de UEA, kiu ricevas la Jarlibron kaj la Revuon "Esperanto", rajtas rabaton de 20,— ned. gld.;

b) Individua membro de UEA, kiu ricevas nur la Jarlibron, rajtas rabaton de 10,— ned. gld.;

c) Edz(in)o de individua membro (de ambaŭ kategorioj) rajtas rabaton de 10,— ned. gld.

Kongresano, kiu pagas la plenan kotizon (70,— gld.) ricevas la revuon "Esperanto" dum la tuta kongresa jaro.

Limdato

Laŭ decido de la Komitato de UEA dum la 51-a U.K., aliĝoj por la 52-a Universala Kongreso estas akceptataj ĝis la 22-a de junio 1967. La limdato indikita sur la aliĝilo (30/6/1967) estas sekve nevalida.

Unua Bulteno

La 4-paĝa grandformata Unua Bulteno kaj la Aliĝilo estas riceveblaj senpage ĉe la Landaj Asocioj kaj Ĉefdelegitoj de UEA, ĉe la Kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

Glumarko

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la Landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 52-a U.K. Prezo: 0,50 ned. gld. (2,— st.) por 10-glumarka folio.

Statistiko (je 22/9/66)

Arg. 1, Aŭstral. 1, Aŭstr. 1, Belg. 3, Braz. 2, Brit. 10, Bulg. 24, Ĉeĥ. 16, Danl. 2, Finn. 1, Franc. 25, Germ. 5, Hisp. 2, Honkongo 1, Hung. 34, Isr. 15, Ital. 5, Jap. 3, Jug. 18, Kan. 1, Mon. 1, Ned. 8, Norv. 3, NovZel. 1, Pol. 80, Rum. 1, Sovet. 1, Sved. 10, Svis. 3, Usono 2. Entute 280 el 30 landoj (pasintjare 142 el 26 landoj).

G. G. Pompilio,
Konstanta Kongresa Sekretario

AERVOJAĜO DE UEA AL TEL AVIV

Amsterdam-Tel Aviv-Amsterdam, kun 10-taga restado en la kongresurbo en hotelo kun dulita ĉambro kaj banĉambro aŭ duŝo, kun matenmanĝo kaj servmono. Forveturo 30.7.1967, reveno 20.8.1967.

Anstataŭ el Amsterdam oni povos forvojaĝi ankaŭ el: Bruselo, Frankfurt, Genevo, Helsinki, Kopenhago, Londono, Marseille, Milano, Parizo, Vieno. La prezoj estas adaptitaj laŭ la diversaj ekirpunktoj. Prezojn el Amsterdam vidu en "Esperanto", junio, p. 117. Pri la aliaj prezoj bv. informiĝi ĉe la Centra Oficejo de UEA aŭ ĉe la koncerna landa asocio.

Postkongresa ekskurso 10-taga, organizata de UEA, okazos de 9 ĝis 20 aŭgusto 1967. Ĝi inkluzivos vizitojn al Ber-Seba kun kamelfoiro, al la kuprominoj de Timna kaj la kolonoj de Reĝo Salomono, al Eilat ĉe la Ruĝa Maro, al Jerusalemo, al la Morta Maro, al Haifa, al la araba urbo Akko, al Sfad en Galileo, al la Lago de Tiberio kaj al Natanja por kelktaga ripozo en belega banloko. Klimatizitaj aŭtobusoj, kompleta prizorgo dumvoje, komfortaj hoteloj kun bano aŭ duŝo, ĉiuj manĝoj kaj servmono inkluzivitaj. Prezo: 560 gld. Por unulita ĉambro oni aldonu 95 gld.

Je definitiva aliĝo, ĉu al la aervojaĝo, ĉu al la postkongresa ekskurso, oni bv. pagi al la Centra Oficejo de UEA 20% de la vojaĝsumo. Aliĝiloj estas riceveblaj de la C.O. Aliajn informojn pri la flugvojaĝo oni trovas en "Esperanto" de junio, p. 116-7.

Informojn pri radio sendu al S-ro G. Largantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por pliaj detaloj vidu la oktobran numeron.

RADIO ROMA. 6-XI, Tra la literaturo; **13-XI**, Novaĵoj el Italujo; **20-XI**, Italaj kanzonoj en Esperanto; **27-XI**, Italaj belartaj urboj: Bergamo; **4-XII**, La itala verkisto Emilio Cecchi; **11-XII**, Italaj regionoj: Toskanio; **18-XII**, La fama pentristo Giovanni Bellini; **25-XII**, Kristnasko. La dua parto de ĉiu dissendo estas dediĉata al "Kuriero de Esperanto". Redaktoro: Luigi Minnaja. La programo estas dissendata ĉiun dimanĉon (ne sabaton kiel erare anoncita en la tabelo de la oktobra numero). La nun uzataj ondlongoj estas 31,33 m (9575 kcs) kaj 25,20 m (11905 kcs). Sama horo, kiel antaŭe: 16.35 ĝis 16.50 GMT.

POLA RADIO en Varsovio dum la vintra sezono daŭre prezentos sian ĉiutagan progra-

mon per la samaj ondlongoj. La estraro de la stacio deziras ekscii, kion pensas la eksterlandaj aŭskultantoj pri la elsendoj de la Pola Radio por eksterlando. Listo de dek precizaj demandoj estas sendata al ĉiu petanto. Ĉiu aŭskultanto, kiu sendos respondon al tiuj demandoj partoprenos lotadon de 500 premioj kaj memordonacoj. Respondojn oni devos sendi ĝis la 15-a de januaro 1967. Skribu al Pola Radio, Poŝtkesto 46, Warszawa, Pollando.

BBC, Londono, komencis elsendi en Esperanto la lastan ĵaŭdon de ĉiu monato en la kadro de bulgarlingva programo, kiu komenciĝas je 21.15 GMT (22.15 MET). Ondoj: 49 m (6,05 mcs), 41 m (7,23 mcs), 31 m (9,51 mcs) kaj 25 m (12,04 mcs). La programo estas eksperimente enkondukita por ses monatoj ekde 25 aŭgusto 1966. Daŭrigo dependos ĉefe de la reagoj de orienteŭropaj aŭskultantoj.



esperanta
novembro 1966

Ĝojiga fakto estas la ĉiama kresko de la nombro de DM de UEA. Tiun kreskon oni pli klare vidas, se oni komparas la nunan nombron kun tiu de antaŭ dek jaroj. Je 1-1-1956 UEA havis 295 DM kaj je 1-1-1966 tiu nombro estis 576, ĝi do preskaŭ duobligis (post 1-1-1966 la nombro kreskis ĝis 635). Pri la DM oni povas diri, ke ili estas la homoj, kiuj decidis, ke ili por ĉiam restos fidelaj al la Internacia Lingvo, kiuj ajn cirkonstancoj venu.

Mi esploris, kia estis la kresko de la nombroj en la diversaj landoj. Kun miro mi konstatis la jenon: en kelkaj landoj la nombro ege kreskis, en aliaj estis meza kresko, kaj en unu lando eĉ estis ioma malkresko. Mi diros ion pri diversaj landoj, sed ne nomos ĉiujn landojn.

En Francujo la nombro de la DM dum la indikitaj dek jaroj kreskis de 15 al 58, en Nov-Zelando de 7 al 34, en Nederlando de 10 al 63, en Usono de 18 al 47, kaj en Finnlando de 1 al 12. Bonegaj ekzemploj do! En Svislando la nombro inter 1956 kaj 1966 ne ege kreskis, sed tie je 1-1-1966 el la 366 membroj 44 estas DM. Tio estas 12%. Neniu alia lando atingis ĝis nun tian procentaĵon.

En la sekvantaj landoj la nombro ankaŭ kreskis. Sed ĝi ne kreskis adekvate al la precipe financaj - eblecoj, kiuj laŭ mia opinio en tiuj landoj ekzistas. La kresko estis: Aŭstrujo de 1 al 7, Aŭstralio de 13 al 18, Belgujo de 4 al 11, Danlando de 1 al 8, Germanujo de 13 al 39, Norvegujo de 7 al 12 kaj Svedujo de 23 al 34. Preskaŭ sama restis la nombro en Italujo, kie je komenco de 1956 UEA havis 4 DM kaj je komenco de 1966 nur 6. Estas en Britujo, ke la nombro iom malkreskis, nome de 70 en 1956 al 69 en 1966.

Estas tute klare, ke UEA havas multajn fidelajn membrojn, al kiuj ne eblas en iu momento elspezi sumon de 20-eble la jara kotizo MA. UEA ĝojas, ke ili estas kaj restas tiaj fidelaj membroj. Do, mi ne turnas min al ili. Sed fakto estas, laŭ mi, ke inter la proks. 6000 individuaj membroj de UEA, kiuj ne estas DM, estas kelkaj centoj, al kiuj eblas sendi unufoje 400,— guldenojn.

Ciu, kiu realece rigardas la nuntempan ekonomion, scias, ke ĉiam pli necesas ŝpari laborhorojn, ĉar ili ĉiam fariĝas pli multekostaj. Fariĝante DM de UEA, vi ŝparos ĉiujare laboron de vi mem, ofte laboron de la ĉefdelegito/peranto kaj ŝparos laboron de la librotenisto kaj administrantino en la C.O. (kaj tio kostas monon al UEA). Mi esperas, ke post lego de tiu ĉi artikolo multaj el tiuj, kiuj povas malhavi 400,— guldenojn, sekvos la ekzemplon de centoj da aliaj membroj kaj sendos 400,— guldenojn al unu el la kontoj de UEA por pagi sian kotizon por la tuta vivo. Por la kontoj vidu paĝon 15 de la jarlibro 1966/I. Tion farinte, vi ekde nun ne plu havos ian zorgon pri jara kotizpago al UEA.

Mi fine atentigas, ke pro la plialtigo de la kotizoj ekde 1967 la pago de 400,— guldenoj por DM validas nur ĝis la fino de tiu ĉi jaro. Ekde 1-1-1967 la kotizo por DM ne plu estos 400,— guldenoj, sed 500,— guldenoj (20-oble 25,— guldenoj). Se vi volas profiti de la ankoraŭ pli malalta kotizo, vi fariĝu DM kaj sendu la monon antaŭ la fino de la jaro 1966. Mi tre ĝojos pri alfluo de multaj novaj DM.

E. J. Woessink
estrarano pri financoj

NEKROLOGOJ

ADEMARO BARBIELLINI-AMIDEI

Grafo adv. Ademaro Barbiellini-Amidei, dum ses jaroj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, forpasis en Torino la 6-an de aŭgusto. Li estis malnova membro de UEA.

IVAN HARALAMPIEV KRESTANOV (1890-1966)

La 4-an de septembro mortis en Sofia s-ro I. H. Krestanov, akademiano. Li lernis la lingvon en 1905, verkis aŭ redaktis multajn librojn, i.a. "Bulgara Antologio", estis dumviva membro de UEA kaj membro de la Internacia Ekzamena Komisiono.

MEMORIGA KALENDARO

Novembro

- 4 20-a datreveno de Unesko
- 30 Ĝen. Konf. Unesko finiĝas

Decembro

- 10 Tago de Homaj Rajtoj
- 15 Zamenhof-Tago, Libro-Tago
- 15-17 Unua Hinda Kongreso, Nova Dilli
- 17 Meksika Kongreso, Meksik-urbo
- 27-2/1 Int. Seminario de GEJ, Münster
- 31 Kongreskotizoj Tel Aviv plialtiĝas

Januaro

- 3-7 Nov-Zelanda Kongreso, Dunedin

Februaro

- 11-25 Skirestadoj en Krimml, Aŭstrujo

Marto

- 31 Limdato por Belartaj Konkursoj
- Kotizoj U.K. Tel Aviv plialtiĝas

Aprilo

- 14 50-a datreveno de morto de Zamenhof
- 30 Limdato kandidatiĝo int. ekzameno

Majo

- 6-13 IFEF-Kongreso, Fulda, Germanujo
- 13-16 Germana Kongreso, Hamburg
- 26-29 Brita Kongreso, Glasgow

NOVAJ DELEGITOJ

Aŭstralio

Melbourne D: Stan Milligan, 274 Mont Albert Road, Surrey Hills E. 10; tel. 83.7948.

Brisbane

FD (Komerco): H. V. Petley, 88 Verney Road West, Graceville; tel. 79.4168.

Britujo

Upminster (Essex) 12 000. D: John Brownlee, 20 Sunnyside Gdns; tel. 4645.

FD (Gasindustrio): la D.

Bulgarujo

Sofia FD (Kulturaj aferoj): Assen Grigorov, bulv. Tolbuhin 10; tel. 8-31-02.

Ĉeĥoslovakujo

Nížkov (Jihomoravský kraj) 500. D & FD (Instruado) & FD (Lingvoj): Jaroslav Grodl, Nížkov 105, distrikto Ždár n. Sáz.; tel. 9543.

Danlando

Nova ĉefdelegito: Arne Kolle, Østergade 22, Hals; tel. (08 14 26 11) 31; pĉk 80 06 35.

Hals (Jylland) 3 000. D & FD (PTT): la Ĉefdelegito.

Germanujo

D-6704 Mutterstadt 9 000. D: Karl Link, Mozartstr. 13; tel. 0 62 34/357.

Kongo (Dem. Resp.)

Kinshasa (antaŭe Léopoldville) 1 250 000 D: David Salambi, rue Kasongo-Lunda 249, St. Jean.

VD: Paul Nzemba-Paku, B.P. 1, Kinshasa 8. FD (Filatelo): la VD.

FD (Instruado): Karel Braet, B.P. 7579, Kinshasa 1.

FD (Radio-tekniko): Louis Ngingi, B.P. 3171, Kinshasa-Kalina; tel. 3171-et. 220.

FD (Skoltismo): la VD.

Nederlando

Leiden FD (Vegetarismo): Dick M. Ponti, Rynlandflat, Bachstr. 60.

Svedujo

Haverövalen (Medelpad) 600. D & FD (Rotario): Carl Viksten, Munkestad; tel. 0690-11406.

VAKAS

Argentino. Santa Fe: D.

Aŭstralio. Sidney: FD (Arto). Nedlands: D.

Brazilo. Alagoinhas: D. Curitiba: FD (Lit.).

Macaé: D. Nova Iguaçu: D, FD (Religio: spiritismo). Pôrto Alegre: FD (Instruado: lingvoj), FD (Stenografio: intersteno). Recife: VD, FD (Sindikataj aferoj). Rio de Janeiro: FD (Juro), FD (PTT), FD (Vivasekuro). Uberlândia: VD.

Britujo. Bodmin: D. Dartford: D. Newcastle: VD. Wolverhampton: VD, JD, FD (Konstruado).

Bulgarujo. Karlovo: D. Kolarovgrad: FD (Filatelo). Ruse: FD (Sindikatismo). Sofia: FD (Bibliografio), FD (Biologio), FD (Fotografio amatora).

Ĉeĥoslovakujo. Prostějov: D, FD (Instruado), FD (Religio: kristanismo).

Ĉilio. Santiago: D, FD (Filatelo).

Danujo. Horsens: FD (Turismo). Silkeborg: FD (Jurnalismo).

Finnlando. Helsinki: VD (Helsinki 71), VD (Helsinki 73), FD (Muziko baroka). Kerava: D, FD (Skoltismo). Mäntsälä: D. Pori: D.

Francujo. Bourg-la-Reine: FD (Statistiko). Champagne sur Vingeanne: FD (Abelbredado). Clermont-Ferrand: FD (Aviado). Fontenay sous Bois: VD. Ile sur Têt: D. Quillan: D. Troyes: D, FD (Junularaj movadoj).

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1966

stato je la 30-a de septembro

Konkurso I

	Lando	kvoto	poentoj	%
1.	Hispanujo	2860	3190	111,53
2.	Belgujo	2055	1960	95,38
3.	Britujo	6691	6287	93,96
4.	Usono	4526	4140	91,58
5. (6)	Francujo	7752	6908	89,11
6. (5)	Svedujo	7180	6390	89,00
7.	Danlando	3099	2635	85,03
8.	Nederlando	5975	4991	83,53
9.	Italujo	4253	3380	79,47
10.	Finnlando	3160	2470	78,16
11.	Svislando	2459	1880	76,45
12.	Brazilo	4142	3032	73,20
13.	Germanujo	7221	4610	63,84
14.	Japanujo	3965	2465	62,17
15.	Jugoslavio	5560	3405	61,24

Konkurso II

1.	Kanado	842	1099	130,52
2.	Israelo	460	585	127,17
3.	Sudafriko	250	260	104,—
4.	Grekujo	270	266	98,52
5.	Aŭstralio	1475	1385	93,90
6.	Aŭstrujo	1475	1295	87,80
7.	Nov-Zelando	1481	1300	87,78
8.	Norvegujo	1755	1410	80,34
9.	Argentino	905	610	67,40
10.	Islando	250	165	66,00
11.	Madagaskaro	250	30	12,00

(Vidu la regulojn sur paĝo 39. Interkrampaj ciferoj indikas pasintmonatajn poziciojn.)

ĈU VI MEMORAS

kolekti kaj sendi ĉiaspecajn poŝtmarkojn al *Peter Zacho, Åmosevej 5 A, Kopenhago Brh.* Danlando? Dum la jaroj ni tiel ricevis milojn da guldenoj. Anticipan dankon!

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Brown, s-ro Clifford H., Christchurch, Nov-Z. Quayle, s-ro C., Tamworth, Britujo.

MEMBROJ-SUBTENANTOJ 1966

359 Knoedt, s-ro L. H., Brazilo. 360 Lewine, s-ro J. L., Usono.

oficiala informilo
n-ro 395, 1 okt. 1966

esperanto
novembro 1966

KOREKTO DONACOJ ĜENERALA KASO

La donaco de prof. d-ro Ivo Lapenna (septembro, p. 160) erare aperis kiel 100,— gld. La ĝusta cifero devis esti: 1000,— (mil) gld. Ni pardonpetas al la donacinto.

DONACOJ POR ĜENERALA KASO (Gld.)

Aŭstralio: Newell, s-ro L., 7,50. Aŭstrujo: Primetzhofer, s-ro F., 7,50. Britujo: Diaz, s-ro A., 1,30; Rossetti, s-ro R., 2,50. Danujo: Langkilde-Rasmussen, s-ino Eva, 7,50; Laug, s-ro H., 7,50. Finnlando: Korpela, dipl. ing. A.E., 7,50. Francujo: Bernard, s-ro Roger, 7,50; Albault, f-ino Odette, 7,50; Franguel, s-ro A., 7,50; Garrigue, s-ro F., 7,50. Germanujo: Richter, s-ro Karl, 7,50. Hispanujo: Criach, s-ro Antonio, 7,50; Martin Gomez, s-ro M., 7,50; Ventura, s-ro J., 7,50. Israelo: Tachauer, s-ro D., 7,50. Italujo: Campetti, prof. G., 7,50; Gambuti, s-ro A., 7,50. Jugoslavio: Esperanto-Societo "Nova Epoko", Vinkovci, 7,50. Kanado: Desmarais, s-ro R., 5,25; Nii, f-ino Agnes, 7,50. Nederlando: Blokpoel, s-ro H. J., 10,46; Postma, f-ino Tj., 100,—. Nov-Zelando: Drengenburg, s-ro H., 2,20. Sud-Afriko: Appel, s-ro H., 11,87. Svedujo: Bengtsson, s-ro Karl, 7,50; Blomberg, s-ro Åke, 7,50. Usono: Cole, s-ro J. A., 7,50; Doneis, s-ro Armin, 7,50; Esperanto Information Center, 7,50; Futran, s-ro John, 7,50; Hullen, s-ro J., 5,50; Lewine, s-ro J. L., 4,51. Aŭstralio: Hanney, s-ro R. J., 7,50. Francujo: Jelenc, s-ro F., 7,50.

POR VASTIGO DE LA AGADO (JARO DE INTERNACIA KUNLABORO, JARO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO) (Gld.)

Kanado: Lewis, s-ro H. J., 7,50. Nederlando: Woessink, s-ro E. J., 7,50.

Sumo entute ricevita: 24 763,32 gld.

Sumo elspezita: 22 979,39 gld.

Saldo pozitiva: 1 783,93 gld.

FONDAJO AZIO-AFRIKO

Finnlando: Vilkki, s-ro Joel, 7,50 gld.

Kuvajto: Isaac, s-ro Nassif, 4,79 gld.

DONACOJ POR INTERNACIA ARTA TEATRO

Germanujo: Degenkolbe, s-ro Carl, 18,08 gld.; Künzel, d-ro H., 6,— gld.

PATRONAJ MEMBROJ DE TEJO 1966

(Vidu "Esperanto", februaro, p. 36)

A. (16,— gld.): 20. Umeda, s-ro Y., Japanujo; 21. Vestegaard-Rasmussen, s-ro H., Danlando; 22. Burger, f-ino M. C., Nederlando; 23. Hölscher, s-ro E., Germanujo.

FONDAJO JUNULARA GAZETO (Gld.)

Danlando: Jørgensen, s-ro G., 48,—. Francujo: Tortel, d-ro L., 107,—. Germanujo: Hölscher, s-ro E., 11,16. Nederlando: Baas, s-ro P. W., 25,—; Burger, f-ino M. C., 20,—.

Al ĉiuj donacintoj plej varman dankon pro ilia granda helpo.

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

ANONCETOJ

(Pri plenumo de promesoj en anoncetoj respondecas sole nur la anoncintoj.)

Ĉu eble ekzistas realaĵoj en la ideo pri sortosistemo tia, ke la vivo havas karakteron de elektra mekanismo, kiu registras eĉ la plej etajn influojn de la unuopa homo kaj donas la rezulton en formo de la reagoj de la ĉirkaŭaĵoj? Petu senpagan ilustritan faldprospekton ĉe Martinus-Instituto, Mariendalsvej 94-96, Kopenhago F, Danlando.

Kelkajn librojn oni aĉetas ĉe la unua ekriĝo. Tia libro estas "La Novaj Vestoj de la Imperiestro", unu el la kolorilustritaj libroj en la H. C. Andersen-serio de KOKO. Petu senpagan prospekton ĉe Eldonejo KOKO, Jyllinge, Roskilde, Danlando.

Letervespero organizota dum januaro 1967. Bonvolu skribi amase al Watford-Esperanto-Societo, 424 St Albans Road, Watford, Herts, Britujo. Respondo garantiata.

Turismo. En Calais, kie okazos proksiman jaron franca nacia kongreso kaj samtempe markola renkontiĝo, fondiĝis Domo de Turismo. Sendu amase gratulkartojn kaj turismajn faldfoliojn esperantlingvajn de ĉie en la mondo, inkluzive de Francujo. Maison du tourisme 12 Boulevard Georges Clémenceau, 62-Calais, Francujo. Pri faldfolioj ĉiam validas.

Maljuna samideano serĉas alian maljunan esp-iston por pasigi kune kelkmonatan kuracperiodon ĉe la fama Instituto de Geriatrio en Bukareŝto. Esp-o-delegitoj surloke. Pasporto 3041256/P, Roŝtrestante, Roma-Sansilvestro, Italujo.

Ni pligrandigas nin, kunhelpu kaj fariĝu

radioamatoro esperanta. OE5HML, OE3RU.

Poŝtmarkojn deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj. Respondoj garantiataj. S-ro E. Thompson, "Chorleywood", Flat 6, 63 Balwyn Road, Balwyn, Victoria, Aŭstralio.

Jam de 1958 Aosta (Italujo) havas Esperanto-straton, sed ĝi estas malgranda, senelireja, nekonvena, preskaŭ netrovebla. Bv. skribi al Sindaco de Aosta aŭ al UEA-delegito Aosta, dirante, ke vi tion ĉagrene konstatis, okaze de via vizito al tiu historia urbo. Tial petu, ke oni redediĉu pli konvenan straton, prefere ĉe romiaj ruinoj, al la Internacia Lingvo.

Sud-Afriko, plej alloga, turista lando meritas viziton. Aervojaĝo povus enteni vizitojn al pliaj Eŭropaj urboj, ankaŭ Tel-Aviv! Revenvojaĝokosto 2662 ned.gld. Pliajn informojn, je respondkupon, donos: Informo, Silverton, Transvaal, Sud-Afriko.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo) turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso: K.S.M., 12, Rue de Jacobins, F-63-Clermont-Fd., Francujo, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

Filatelisto deziras interŝanĝi p.m. kun ĉiuj landoj — kontraŭ 100/200 diversaj, sendas samon el Francujo. S-ro R. Melo, 15 rue de la Richelandière, F-42 Saint Etienne, Francujo.

Lernejoj! Partoprenu kun viaj klasoj en la lernigaj rondoj "Grajnoj en Vento". Unikaj en la mondo! Grajnoj en Vento, rue des Pins 66, CH-2500 Bienne-Biel 7, Svislando.

ĈU VI JAM PAGIS LA KOTIZON DE 1967?

Por eviti ĉiujn zorgojn pri kotizpagado,
petu vian bankon aŭ poŝtĉekoficejon ĉiujare
transpigi por vi aŭtomate je difinita dato.
Akurata kotizado ŝparigas monon al UEA!

En 1967 reaperos

GEPATRA BULTENO

sub aŭspicio de UEA

Forumo kaj helpilo por gepatroj, kiuj instruas
Esperanton al siaj infanoj. Subtenu ankaŭ vi
ilian gravegan agadon per via abono! Aperas
kvaronjare, bele multobligita kaj ilustrita.

Redaktas Derrick P. Faux. Jarabono: 3,50 gld.
(7 ŝil., 14 st.). Peranto: UEA.

Oni skribis pri

KAŬKAZAJ RAKONTOJ

"Ĉi tiuj rakontoj estas ĝuo por la amatoroj de
streĉaj aventuroj, sed ankaŭ de bela prozo, ĉar
Lermontov, giganto de la rusa poezio, estas
ankaŭ majstro de la prozo, kaj feliĉe la
traduko de D. Staritsky estas ne nur fidela,
sed ankaŭ vigla kaj bonstila."

Michel Duc-Goninaz en Heroldo

"Kvankam la rakonto estas strikta, dinamika
kaj tute ne enuiga, oni bezonas trankvilan
horon, se oni vere volas ĝui ĝin en ĉiuj nuan-
coj. Kaj tio, ŝajnas al mi, estas signo, ke
temas pri 'klasikaĵo'."

Stefan Maul en Germana Esperanto-Revuo

"Turnante la lastan paĝon oni pensas bedaŭre:
'ha! jam finita!', kio estas laŭ mi la plej bona
— kaj por esperantlingva verko malofta —
komplimento."

G. L. en SAT-Amikaro

Prezo (kun alloga moderna bindaĵo): 5,— gld.

Jusa STAFETO-libro !

VOJAĜO INTER LA TEMPOJ GRAMATIKA STUDIO

de

K. KALOCSAY

Nia Budapeŝta Majstro sukcesis beligi nian
lingvistikan panoramon per verko, kiu, rilate
al la -ata/-ita afero, pleje pravigis la aserton
de D-ro Zamenhof: "Lingvo estas **pure kondiĉa**
signado de ideoj, kiu povas plenumi sian
difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin **severe egale**
— alie ĝi perdas sian sencon kaj celon, kaj
servas ne al reciproka komprenigado, sed al
malkomprenigado" (O.V., 425)

Temas pri la plej trankvila, kvieta, objektiva,
scienca monografio pri tiu nur ŝajne malfacila
temo -ata/-ita, monografio, kiu, por la unua
fojo, enkorpiĝas la doktrinon de ĉiuj partioj
en unu harmonian tuton, surbaze de nia lingva
tradicio, baziĝinta sur la zamenhova verkaro
Libro nepre havinda de ĉiu lingve interesata
esperantisto !

200 paĝoj en formato 16 x 22 cm.

Prezo: 2.40 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro

Mendu tuj ĉe la Libroservo
de UEA

aŭ ĉe J. Régulo, Apartado 25, LA LAGUNA-
Tenerife — Kanariaj Insuloj

La ĉie ŝatata rektametoda lernolibro

PRIVILEGIA VOJO

al lingvoscio: Esperanto

Jam 16'500 ekzempleroj presitaj de la
internacia kaj naciaj eldonoj! Bone
uzebla tiel por kursoj kiel por mem-
lernantoj. Instruas ĉiujn novajn vor-
tojn per simboloj, ilustraĵoj aŭ per
jam lernitaj vortoj; kontinua teksto.

Mendebila kun instrukcioj en angla,
araba, dana, franca, germana, hebrea,
hispana, itala, japana, nederlanda,
norvega, portugala kaj Esperanto, laŭ
elekto.

Prezo: 13 steloj (3.25 gld.) plus afranko. Sola
vendrajto ekster Skandinavio: UEA.

LERNOLIBRO POR LA TUTA MONDO

EL POPOLA ĈINIO

Sinteza Esperantlingva gazeto, aperanta dumonate en 40 paĝoj
19 x 26 cm. riĉe ilustrita kun multkoloraj kovrilo kaj bildopaĝoj

Abonkotizoj :

- Por 1 jaro : 0-5-0 £ 2.50 gld.
- Por 2 jaroj : 0-7-6 £ 3.80 gld.
- Por 3 jaroj : 0-10-0 £ 5.00 gld.

Favoraj Donacaĵoj :

1. Ĉiu, kiu abonas nian gazeton antaŭ 28/feb./1967, ricevos senpage unu ekz. de

ESPERANTA KALENDARO, 1967

2. Ĉiu, kiu sukcesas varbi por ni novajn abonantojn, ricevos donacaĵo(j)n laŭ sia atingo en la varbado

Abonu ĉe :

1. Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando (Poŝtĉekkonto 378964)
2. Libroservo de Ĉina Esperanto-Ligo, P.O. Kesto 313, Pekino, Ĉinio
3. Perantoj de EPC en diversaj landoj.

Senpagan specimenon ni sendos laŭ peto

HEROLDO

DE ESPERANTO

LA PLEJ POPULARA SENDEPENDA INTERNACIA ESPERANTO-ORGANO

De 46 jaroj je la servo de la Internacia Lingvo

- ☆ 18 numeroj jare
- ☆ Aktualaj ilustritaj raportoj el la tuta mondo
- ☆ Kultura paĝo pri literaturo, arto, muziko, sporto, kinoarto, ktp.
- ☆ Duobla Kongresa numero
- ☆ Libera Tribuno de la legantoj

Abonebla ĉe la Landaj Perantoj aŭ ĉe UEA

jarabono: 4 \$ (55 steloj)

Mendu provnumeron ĉe la Redakcio: 13 rue de la Reinette — Pippelingstraat, Bruselo 1

Redaktorino: Ada Fighiera-Sikorska

ESPERANTO: A NEW APPROACH



William Auld, M.A., D.B.E.A.

*Member of the Esperanto Academy
Principal Teacher of English at Grange School, Alton*

ELDONIS : HEROLDO

**La plej moderna lernolibro de Esperanto
por angle parolantoj !**

14 lecionoj kun ŝlosilo por memlernantoj.
Literaturaj legaĵoj el la plumo de la plej
famaj Esperanto-verkistoj.
Vortareto Esperanto-angla.


Prezo: 1,20 \$ (8/7 ŝil.)

Ĉiu ekzemplero entenas rabatkuponon en valoro
de 0,30 \$ validan por aĉeto de "Fabeloj" de
H. C. Andersen, vol. IV (trad. D-ro L. L. Zamen-
hof).

W. AULD instruas Esperanton laŭ *nova didaktika
metodo*, nome laŭ la ecoj de la internacia lingvo
mem kaj ne laŭ la strukturo de la angla lingvo.
Aĉetu ĉe via Libro-Servo aŭ ĉe U.E.A.

Vasta

**saŭno-forno estas
ŝatata koro
de originala finna
saŭno**



PER BRULIGOLEO FUNKCIANTA
VASTA-FORNO ESTAS TRE
ALTKVALITA LAŬ TERMOTEKNIKO.

VASTA-FORNO, LA REZULTO DE
PROFUNDA KAJ LONGDAŬRA
EKSPERIMENTADO, ESTAS TRE
POPULARA INTER POSTULEMAJ
FINNAJ SAŬNO-UZANTOJ.

VASTA-FORNO ESTAS MODERNA
SAŬNO-HEJTILO, KIES
UTILPROPORCIO ESTAS Ĉ. 90 %.

VASTA-FORNO ESTAS PROVITA
DE ŜTATA EKSPERIMENTEJO
DE FINNLANDO.

Vasta — FORNO

- ESTAS FACILE MUNTEBLA
- VARMECO REGEBLA PER
REGULIGILO
- FUNKCIIGEBLA RAPIDE
KAJ PURE
- **VASTA-FORNO** ESTAS SEKURA:
NE HALADZON, NE FULGON,
NEK RISKON DE INCENDIO.

VASTA-SAŬNO-FORNOJN ONI
UZAS JAM EN FINNLANDO,
SVEDUJO, ISLANDO, GERMANUJO,
SVISLANDO, AŬSTRIO KAJ USONO.

MENDOJ REKTE AL LA FABRIKO

manukone

RAISIO — FINNLANDO

ESPERANTA
KORESPONDADO AL

EMRI

BOX 650
TURKU 6
FINNLANDO

LA REPRESENTANTO EN GERMANUJO:

HANSESTÄDTISCHE IMPORT G.m.b.H.

FINJARK-SAUNA 2000 HAMBURG 70, WANDSBEKER
MARKTSTRASSE 141, POSTFACH 13424, TELEFON 683484

LA PLEJ MALNOVA FABRIKO DE
OLEO- KAJ GASFORNOJ POR
SAŬNO EN FINNLANDO.